

LA JUNA PENSO

organo
de
SAT
junul
fako



MEMVOLA

La Boesi
(La Boetio)

MEMVOLA SUPLEMENTO

ELFRANCIGO kaj ENKONDUKO
de kamarado R O L.

Suplemento al "La Juna Penso" - Marto 1970

SERVULTO



Stefano de La Boesi (Etienne de La Boétie) naskiĝis en Sarlato (Sarlat), pentrinda urbeto en Perigordo, 150 km-ojn oriente de Bordoza.

El burĝa familio riĉa je juristoj, li ricevis bonegan edukadon en klera medio favora al humanismo, kaj aĉetis konsilianan oficon ĉe la Bordoza Parlamenta Kortumo (1553). En tiu epoko markita de reĝa absolutismo kaj de religiaj kvereloj, kiuj kondukis Francion al longa civila milito ekde 1562, li montris liberalan moderecon, kontraste kun la fanatika katolikismo de liaj bordoza kolegoj.

Tiu modereco inspiras lian mision al Aĝeno (Agen) (1561), en kiu li konsentas avantaĝojn al ambaŭ partioj, samkiel lian memuaron pri la reĝa "Januara Edikto" (1562) favora al toleremo.

Li mortis, juna, en 1563, en la ĉeesto de sia amiko Montanjo (Montaigne).

Tiu paro restas inter la plej famaj el la franca literaturo. Sed Montanjo montriĝis pli singarda ol La Boesi. Tial, el verkaro neniam presita dum la vivo de la aŭtoro, li eltiris por publikigo en 1570 nur la nepolitikajn pecojn, poemojn kaj tradukojn.


"Parolado pri memvola servuto" datiĝas proksimume de 1548 ; aldoniĝis kelkaj korektoj ĝis 1553. Montanjo ne volis diskonigi ĝin, eĉ provis stompi ĝian revolucian karakteron, atribuante ĉi tiun al junaĝa impeto.

Cetere, la destino de tiu pamfleto disvolviĝis laŭ du direktoj. En ĝi la moderuloj vidas kvazaŭan pekon de bril-dotita koleĝiano saturita de greklatinaj klasikaĵoj. Ili indulge cedas, ke la ĉefa merito de tiuj paĝoj kuŝas en vigle konvinka stilo ; kaj la liceaj lernolibroj plejofte ignoras La Boesi.

Sed kiel forgesi, ke en tumultaj periodoj - de religiaj militoj ĝis Granda Revolucio kaj hitlera okupado - tiu peco, kaŝe presita, pli malpli torde adaptita al tiamaj pasioj , utilis kiel porlibera batalilo kontraŭ ĉiuspecaj regpovoj ? Tiagrade, ke ĝi siavice fariĝis klasikaĵo por ĉiuhorizontaj liberamantoj, speciale por liberecanoj.

La Boesi, lojala servanto de sia reĝo, eble mirus hodiaŭ pri la vidpunktoj de iuj disĉiploj. Sed ĉu ni neglektu la internan propran forton de libroforma torĉo, kiu, elglitante el la manoj de sia aŭtoro, disflamis memstare kun neestingebla junardo ?

Tial oni rajtas esperi, ke, forgesante la supre elvokitajn cirkonstancojn, la nuntempa junularo facile rompos la oston de cicerona retoriko por sin nutri per plene aktuala medolo...



"Vasali al pluraj utilas al neniŭ

Nur unu estu mastro, ununura reĝu"

tiel parolis Uliso, publike, laŭ Homero. Se li dirus nur

"Vasali al pluraj utilas al neniŭ"

tio estus perfekta sen aldono. Sed, anstataŭ prudente aserti, ke pluropa superregado ne povas esti bona, ĉar ununura potenco de kiu sin titolas Mastro estas malmilda kaj malsaĝa, - male asertis Uliso

"Nur unu estu mastro, ununura reĝu."

Tamen ni senkulpigu Ulison, kiu tiam eble devis uzi tiajn dirojn por kvietigi ribelantan armeon, adaptante sian parolmanieron, - laŭ mi - pli al oportuno ol al vero. Sed, por saĝe paroli, ege malfeliĉa estas la regato de iu mastro, kies bonkoreco ĉiam restas dubinda, ĉar li laŭvole povos malice konduki. Kaj se oni havas plurajn mastrojn, kiom da mastroj, tiom da malfeliĉoj. Mi ne intencas nun diskuti pri la tiel debatita temo "ĉu la aliaj ŝtataj sistemoj estas preferindaj ol monarkio", tamen mi ŝatus scii, antaŭ ol demandi kiun rangon atribui al monarkio inter la respublikoj^o, ĉu ĝi rajtas unuan rangon, ĉar oni malfacile kredas, ke iel publika estas tiu sistemo, en kiu ĉio apartenas al unu. Sed ni rezervu tiun temon por alia tempo, ĝi postulus apartan traktaĵon, aŭ pli ĝuste tirus post si ĉiajn politikajn polemikojn.

Hodiaŭ mi volas nur kompreni, kiel eblas, ke tiom da homoj, da burgoj, da urboj, da nacioj, kelkfoje elportas unu solan tiranon, kiu havas nur tiun povon, kiun oni konsentas al li; kiu kapablas malutili al ili nur kiom ili bonvolas tion toleri; kiu ne povas fari malbonon al ili, escepte kiam ili preferas tion suferi, ol kontraŭstari lin. Jen mirinda afero kaj tamen tiel kutima, ke ĝi fariĝas dolora sed ordinara: vidi unu milionon da homoj mizere servutantaj, kiel bestoj sub jugo, ne kurbigintaj sub pli granda forto, sed iel (laŭŝajne) sorĉataj kaj ĉarmataj de la nura nomo de unu, kies povon ili ne devus timi, ĉar li estas sola,

^orespubliko: ĉi tie origina signifo = publika afero.

kies virtojn ili ne devus ŝati, ĉar li kondutas malhumane kaj sovaĝe kontraŭ ili. Tia estas nia homa malforto, ke ni devas ofte obei la forton; necesas prokrasti, oni ne ĉiam povas esti la plej forta. Se do iu nacio estas subigita de unu per militforto, kiel Ateno sub la tri-dek tiranoj, ni ne miru, ke ĝi servutas, sed ni plendu pri tiu akcidento, - aŭ pli ĝuste ni nek miru nek plendu, sed pacience elportu la domaĝon kaj preparu pli bonan estonton.

Nia homa naturo estas tia, ke gravan parton de nia vivo ni dediĉas al la amikaj devoj. Estas saĝe ŝati la virton, admiru la grand-farojn, sin montri dankema al kiu bonfaris al ni, ofte ĝeni nin por doni honoron kaj profiton al tiu, kiun ni amas kaj kiu meritas tion. Sekve, se loĝantoj de iu lando renkontis iun grandulon, kiu sin pruvis sagaca por ilin defendi, zorgema por ilin regi; se, ek de tiam ili kutimiĝis obei lin kaj tiel fidi lin, ke ili konsentu al li kelkajn profitojn, mi ne scias, ĉu tiu sinteno estas saĝa. Sed ĉu pli saĝe deloki lin de tiu posteno, kie li sukcesis, por transloki lin en alian, kie li malbone agos? Ja neevitebla estas tiu bonkoreco ne timanta malutilon de kiu nur bonon faris.

Sed ho, bona Dio! kio estas tio? kiel nomi ĝin? kia estas tiu malfeliĉo? Kia malvirto, aŭ pli ĝuste kia kompatinda malvirto, vidi nenombreblan popolamason ne obeanta, sed servutanta, ne regata, sed tiranata, disponanta nek havaĵon, nek parencojn, nek infanojn, nek eĉ vivon proprajn? Suferanta la rabadojn, la diboĉojn, la kruelaĵojn ne de iu armeo, ne de barbara tendaro kontraŭ kiu ĝi devus defendi sian vivon kaj sangon, sed de unu; ne de Herkulo aŭ Ŝimŝono, sed de ununura hometo, kaj plejofte de la plej malkuraĝa kaj malvira el ĉiuj nacioj; ne kutiminta enflari la batalan pulvorodoron, sed apenaŭ la sablon de la turnirejoj; ne nur nekapabla forte komandi al viroj, sed nekapabla malnoble servi al la plej sensignifa virineto! Ĉu ni nomu tion malkuraĝo? Ĉu ni diru, ke tiuj servutuloj estas malkuraĝaj kaj lacegaj? Se du, tri, kvar homoj ne sin defendas kontraŭ unu, tio estas stranga, sed ebla; oni rajtas diri, ke kuraĝo forestas de ili. Sed se cent, se mil homoj suferas sub unusola, ĉu oni ne diros, ke ili ne volas, ne aŭdacas sin turni kontraŭ lin, ne pro malkuraĝo, sed pro malestimo kaj malŝato? Se oni vidas ne cent, ne mil homojn, sed cent provincojn, mil urbojn, unu milionon da homoj timantaj ataki nur unusolan homon, de kiu la plej bone traktita regato ricevis servutecon kaj sklavecon, kiel ni nomu tion? Ĉu malkuraĝo? Nu, ĉiuj malvirtoj havas netransireblan limon. Du povas timi unu, eble ankaŭ dek; sed mil, sed unu miliono, sed mil urboj ne pro malkuraĝo rezignas defendon

kontraŭ unu. Malkuraĝo ne atingas tiun gradon, ke nur unu eskaladu fortikaĵon, alsturmu armeon, konkeru reĝolandon. Sekve, kia estas tiu monstra malvirto, kiu eĉ ne indas la titolon malkuraĝo, por kiu taŭgas neniu sufiĉa fivorto, kiun Naturo malagnoskas kaj al kiu la lingvo rifuzas vorton ?

Oni arigu unuflanke kvindek mil armitojn, kontraŭe saman nombron ; oni batalcele ordigu ilin, unuj libere luktantaj por sia sendependeco , la aliaj por depreni ĝin de ili. Kiuj supozeble venkos ? kiuj pli vigle bataliros ? Tiuj, kiuj esperas konservi sian liberon kiel rekompenco de sia peno, aŭ tiuj, kiuj ricevas nur servutecon kiel pagon de la donitaj aŭ suferitaj batoj ? Unuj senĉese retrovidas sian ĝisnunan feliĉon kaj esperas daŭran bonstaton. Ili konsideras malpli, kion ili devas suferi dum mallonga batalo, ol kion senfine suferos ili kaj iliaj infanoj kaj ilia tuta posteularo. La aliajn kuraĝigas nenio, krom iometa rabemo tuj moderata kontraŭ la danĝero, kaj kies ardo tuj estingiĝas je la unua sangoguto. La tiel famaj bataloj, kie venkis Milciado, Leonido, Temistoklo, kvankam datiĝantaj de dumil jaroj, tamen vivas en la libra kaj homa memoro tiel freŝe, kvazaŭ ili estus ĵus okazintaj por la feliĉo de Grekio kaj la edifado de tutmondo. Via opinio, kio donis al tiel malgranda popolo ne la povon, sed la kuraĝon kontraŭstari la forton de tiom da ŝipoj, ke la maro mem estis superŝarĝita ? la kuraĝon venki tiom da multthomaj nacioj, ke la tuta greka soldataro ne sufiĉus por provizi per oficiroj la malamikajn armeojn ? Ŝajnas, ke dum tiuj gloraj tagoj, ne estis Grekoj kontraŭ Persoj, sed la venko de libero super premo, de emancipiĝo super rabemo.

Estas io stranga aŭdi pri la braveco, kiun la libero enigas en la koron de siaj defendantoj ; sed kion oni konstatas en ĉiuj landoj, inter ĉiuj homoj, t. e., ke unu homo skurĝas cent milojn kaj senigas ilin je libero, - kiu tion kredus, se oni nur aŭdus, ne vidante ? Se oni aŭdus , ke tio okazas laŭdire en fremdaj malproksimaj landoj, ĉiuj opinias, ke temas pli verŝajne pri fabelo ol pri vero.

Kontraŭ tiu izola tirano ne necesas batali, ankaŭ ne sin defendi , li estas per si mem venkita, kondiĉe, ke la popolo ne konsentu pri propra servuteco. De li oni deprenu nenion, sed al li oni nenion donu. Ne necesas, ke la loĝantaro pene faru ion por si, sufiĉas, ke ĝi faru nenion kontraŭ si. Estas la popoloj mem, kiuj sin lasas aŭ pli ĝuste sin igas turmenti, ĉar se ili ĉesus servuti, ili liberiĝus. Estas la popolo, kiu tranĉas al si la gorgon, kiu - libera elekti inter dependeco kaj libero - forlasas sian sendependecon kaj sin lokas sub jugon ; kiu konsentas, eĉ sopiras sian malbonon. Se reakiri sian liberon kostus penon al la popolo, mi ne urĝus

ĝin, kiel ajn grava devas esti por ĝi la rekonkero de natura rajto kaj, se tiel diri, la reveno de besta al homa stato. Tamen mi ne postulas tiel grandan maltimon ; mi cedas, ke ĝi preferu ian sekurecon en mizera vivo, ol dubindan esperon pri bonstata vivo. Nu, se por esti libera, sufiĉas deziri, se bezonas simpla volo, ĉu troviĝos en la mondo unu nacio taksanta tro multekoste pagi liberon per ununura deziro ? Ĉu troviĝos unu nacio, kiu domaĝos sian volon reakiri tiun bonaĵon por kiu oni elverŝu sian sangon kaj kies perdo inspiru al digna homo malŝaton al vivo kaj sopiron al morto ? Eliĝante el eta fajrero, la fajro altiĝas kaj des pli vigliĝas, ju pli ĝi trovas lignon. Por estingi ĝin, ne necesas ĵeti akvon, sufiĉas, ke oni ne plu metu lignon ; tiam, disponante nenion konsumotan, ĝi konsumiĝas, perdas sian tutan viglecon kaj ne plu estas fajro. Same pri la tiranoj : ju pli oni donas kaj servas al ili, des pli ili gajnas novajn fortojn por ĉion neniigi kaj detruiri. Male, se oni nenion donas al ili, se oni ne obeas ilin, sen bato, sen batalo, ili restas nudaj kaj venkitaj, kaj neniĝas ; samkiel radiko, kiu sen suko, sen nutraĵo, sekiĝas kaj mortas.

Por akiri bonon al si, la aŭdaculoj ne timas danĝeron, la prudentuloj ne domaĝas sian penon. La malkuraĝuloj kaj la malvigluloj kapablas nek elporti la malbonon, nek reakiri la bonon ; ili kontentiĝas nur dezirante ĝin, kaj ilia malkuraĝo senigas ilin je postulemo ; restas nur natura sopiro. Tiu sopiro, tiu deziro estas komunaj al saĝuloj kaj al malsaĝuloj, al kuraĝuloj kaj al malkuraĝuloj ; ĉiuj deziras ĉion, kio havigos al ili feliĉon kaj kontenton, kun ununura escepto : la naturo, mi ne scias kial, ne inspiras al homoj sopiron al libero, kiu tamen estas tiel grava kaj feliĉiga riĉaĵo, ke ties perdo tiras post si ĉiujn plagojn, dum eĉ tio konservita tute perdas sian bonguston pro servuta putrado. Nur liberon homoj ne deziras pro tiu simpla motivo, miaopinie, ke se ili dezirus ĝin, ĝin ili ĝuus, - kvazaŭ ili rifuzus tiun altvaloran akiraĵon nur pro tro facila atingebleco.

Kompatindaj kaj mizeraj homoj, malsaĝaj popoloj, nacioj obstinantaj en via malbono kaj blindaj kontraŭ via bono, vi lasas sub viaj okuloj predi la plej gravan kaj valoran parton el via havaĵo, rabadi viajn kampojn, priŝteli viajn domojn, forporti el ili gepatrajn kaj antikvajn meblojn ! vi vivas tiel, ke vi ne povas aserti, ke io ajn estas propraĵo via. Ŝajnas, kvazaŭ de nun vi opinius vin bonŝancaj tenante duonfarme vian havaĵon, vian familion, vian vivon. Kaj tiu damaĝo, tiu aflikto, tiu ruino venas tute ne de malamikoj, sed ja de la malamiko, de kiu tiras el si sian potencon, por kiu vi tiel kuraĝe militiris, por kies gloro vi konsentas riski morton. Kiu tiel mastras vin, tiu havas nur du okulojn, du manojn, ununuran korpon,

kaj nenion plian ol kion havas la plej ordinara homo el nenombrebla urbanaro, - nenion, krom la avantaĝon, kiun vi cedas al li por detrui vin. El kie, se ne el vi, venas al li tiom da okuloj por spioni vin ? el kie tiom da manoj por frapi vin, se ne la viaj ? el kie tiom da piedoj por treti viajn urbojn ? Kial li superfortas vin, se ne dank'al vi mem ? Kiel li povus alsturmi vin, se ne en akordo kun vi ? Kion li povus fari, se vi ne estus ricelantoj de la rabisto, kiu ŝtelas vin, komplikoj de la murdisto, kiu mortigas vin, kaj perfidantoj kontraŭ vi mem ? Vi semas, por ke li predu la fruktojn ; vi plenigas kaj meblas viajn domojn, por provizi lin per rabaĵoj ; vi edukas viajn filinojn por ke li povu satigi sian voluptamon ; vi edukas viajn filojn, ke li sendu ilin al siaj militoj, al buĉejo, ke li uzu ilin kiel ilojn de sia avido, kiel plenumantojn de siaj venĝoj ; vi korprompte laboras, ke li povu sin dorloti kaj sterniĝi en hontindaj diboĉoj ; vi malfortigas vin por plifortigi lin, por ke li pli rigide bridu vin ; de tiom da indignindaĵoj, - kiujn la bestoj mem ne sentus aŭ ne tolerus - vi povas liberiĝi, se vi provas, eĉ ne liberigi vin, sed simple voli ĝin. Firme decidu ne plu servuti, kaj jen vi liberaj. Mi ne volas, ke vi flankenpuŝu aŭ ŝancelu la tiranon, sed nur, ke vi ne plu subtenu lin, kaj vi vidus lin, kiel koloson senbazigitan, proprepeze disfali kaj rompiĝi.

Ja prave la kuracistoj rekomendas ne tuŝi la nekuraceblajn vundojn, kaj mi ne saĝe agas predikante tion al la popolo, kiu de longe perdis konscion ; tiu sendoloreco cetere sufiĉe pruvas, ke mortiga estas tiu malsano. Ni esploru, se eblas, kiamaniere tiu obstina servutemo enradikiĝis tiel profunde, ke nun la amo mem al libero ne ŝajnas natura.

Unue, mi ne dubas, se ni gvidus nian vivon laŭ la rajtoj donitaj de la naturo kaj laŭ ĝiaj instruoj, ke ni obeus al niaj gepatroj, submetiĝus al la saĝo, sed servutus al neniu. Ĉiu proprasparte povas atesti obeon al siaj gepatroj, sen ekstera admono. Pri la saĝo, ĉu ĝi naskiĝas kun ni aŭ ne, - kia temo estas funde pritraktita de la akademia skolo ° kaj debatita de ĉiuj filozofoj, - mi opinias, ke en nia animo kuŝas ia ĝermo de saĝo, kiu, vartita per bonaj konsiloj kaj kutimo, floras kiel virto, sed male velkas, se malvirtoj sufokas ĝin. Kiel ajn estu, almenaŭ unu klara punkto en la naturo ne permesas blindan ignoron, tio estas, ke la naturo, ministro de Dio, gvidanto de l'homoj, kreis nin ĉiujn samformaj kaj, ŝajnas, per sama muldilo,

° akademia skolo : disĉiploj de Platono.

por ke ni povu rekoni unu la alian kiel kunulojn aŭ pli ĝuste kiel fratojn. Se, dividante siajn donacojn, Naturo favoris kelkajn, korpe aŭ spirite, tamen ĝi ne intencis nin loki en ĉi tiun mondon kiel en turnirojn, ĝi ne sendis tien la plej fortajn nek la plej prudentajn kiel arm-itajn rabistojn en arbaron por malmilde trakti la malfortulojn. Prefere kreu, ke, atribuante pli al unuj, malpli al aliaj, ĝi celis instigi al frata amo inter unuj helpokapablaj kaj aliaj helpobezonantaj. Se do tiu bona patrino donis al ni ĉiuj la tutan terglobon kiel loĝejon, loĝigis nin ĉiujn en iel sama domo, kreis nin ĉiujn el sama pasto por ke ĉiu povu sin rigardi, preskaŭ rekoni en la alia kvazaŭ en spegulo; - se ĝi donis al ni ĉiuj komune tiun altvaloraĵon, la voĉon, la parolkapablon, por ke ni pli interrilatu kaj interfratiĝu, por ke la reciproka eldiraĵo de niaj pensoj konduku al komuna volo; - se ĝi ĉiel strebadis tiel forte streĉi la kunligon de nia socio kaj alianco; - se ĝi ĉiel evidentigis sian volon fari nin ĉiujn ne ligitaj, sed unu; - ni ne dubu, ke ni estas nature liberaj, ĉar ni estas kunuloj; kiu do povus imagi, ke Naturo, kuniginte nin ĉiujn, servutigu iun?

Sed verdire ja neutile estas debati, ĉu libero estas natura, ĉar oni ne povas servutigi iun ne malutilante al li, dum nenio pli kontraŭas la esence saĝan naturon ol malico. Restas do por diri: natura estas la libero, mia opinio ni naskiĝis ne nur kun ties posedo, sed kun amo al ties defendo. Nu, se okaze ni dubas pri tio kaj tiel degeneris, ke ni kapablas distingi nek nian bonon, ankaŭ nek nian naturan staton, mi devos trakti vin laŭ via merito: mi grimpigis brutojn al katedro, ke ili instruu al vian naturon kaj vian staton. La bestoj, - Dio helpu min! - krias al homoj, se ĉi tiuj ne tro ŝajnigas surdecon: "VIVU LIBERO!"

Pluraj el ili mortas apenaŭ kaptitaj. Samkiel fiŝo perdas sian vivon samtempe kiel akvon, tiuj bestoj rezignas la lumon kaj ne konsentas postvivi sian naturan liberon. Se la bestoj agnoskas inter si superrangecon, ili asignas al libero nobelan rangon. La aliaj bestoj, do la plej granda ĝis la plej malgrandaj, kiam kaptataj, tiel vigle rezistas per ĉiuj ungoj, kornoj, piedoj, beko, ke ili tiel sufiĉe montras kion altvalora ili taksas, kion ili perdas. Kaptitaj, ili pravas sian konscion pri malfeliĉo per tiom da videblaj signoj, ke nedubable ili de nun pli velkos ol vivos, kaj vivos pli por priplori sian perditan bonstaton ol plezurigi en servuto. Tia estas la elefanto: defendinte sin ĝis ellaciĝo, vidante nenian savrimedon, tuj kaptota, ĝi enigis siajn makzelojn en arbojn kaj rompas siajn dentegojn; ĉu tio signifas, ke ĝia sopirego al denaska libero spiritoveke efikas kaj sugestas al li marĉandon kun la ĉasistoj, ke ili kvitigu ĝin kontraŭ ĝiaj

dentegoj, ke ĝi per eburo elaçetu sian liberon ? Ni allogas la ĉevalon ek de ĝia naskiĝo por malsovaĝigi ĝin cele al servutigo ; malgraŭ tio, ni ne sukcesas sufiĉe flatlogi ĝin, ke ĝi ne mordu la enbuŝaĵon, ke ĝi ne kalcitru kontraŭ la sprono, kvazaŭ ĝi volus montri al naturo, kaj atesti, ke ne propravole, sed pro trudo nia ĝi servutas. Kion ni konkludu ?

"Eĉ la bovoj sub jugpezo ĝemas,

Kaj en kaĝo la birdoj lamentas"

kiel mi iam diris, kiam rimante mi pasigis mian tempon : ĉar, skribante al ci, ho Longa °, mi ne timas almiksi versojn miajn, kiujn mi neniam laŭtlegas, tial, ke ŝajnigante kontenton pri ili, ci glorigas min.

Ĉar ĉiuj sentokapablaj estaĵoj doloras pro submetiĝo kaj strebas al libero ; ĉar eĉ la dombestoj ne povas kutimiĝi al servuto sen protesto, kiu malbonŝanco denaturigis la homon, verdire nuran kreiton destinitan al libera vivo, kaj perdigis al li la memoron de lia origina stato kaj la deziron reakiri ĝin ?

Estas tri specoj de tiranoj. Mi celas la malbonajn princojn. Unuj regas elektitaj de la popolo, aliaj per la forto de armiloj, aliaj pro heredo. Kiuj akiris la regpovon per militrajto, tiuj kondukas tiel, ke oni ne povas dubi, ke ili troviĝas en konkerita lando. La denaskaj reĝoj ĝenerale ne estas multe pli bonaj, sed, naskitaj kaj edukitaj meze de tiraneco, ĝin ili mamsuĉas samtempe kiel lakton kaj traktas sian popolon kiel sian heredan servutularon ; ili uzas sian reĝolandon kiel heredaĵon, laŭ propra karaktero, avara aŭ profitema. Kiu ricevis de la popolo la ŝtaton, tiu devus esti, miaopinie, pli tolerebla kaj ja tia estus, se, tuj kiam li sin vidas altigita super la aliaj, flatita de io nedifinebla nomita grandeco, li ne decidus firme sin teni je tiu posteno. Li kutime celas transdoni al siaj infanoj la potencon, kiun li dankas al la popolo. Kaj tuj kiam ili ambicias tion, oni ne povas imagi, kiom ili superas la aliajn tiranojn per ĉiuspecaj malvirtoj kaj eĉ kruelaĵoj. Por firmigi la novan tiranisman, ili ne vidas alian rimedon, ol plivastigi la servutecon kaj dekutimiĝi siajn regatojn de la libero, tiagrade, ke ĉi tiuj perdu la memoron pri tamen freŝdata libero. Tiel, verdire, mi ja vidas inter tiuj tiranoj ian diferencon, sed ne elekteblon ; kaj kiel ajn diversaj estas la vojoj al regado, ĉiam preskaŭ sama restas la regmaniero. La elektitoj traktas la popolon kiel dresotan virbovaron ; la konkerintoj, kiel predon ; la heredintoj, kiel naturan sklavaron.

° Longa : antaŭulo de La Boesi kiel konsiliano ĉe la Bordoza Parlamento (tiama kortumo).

Sed jen, se okazem nun naskiĝas kelkaj tutnovaj homoj, nek kutimintaj la submetitecon, nek sopirantaj la liberon, sciantaj nek pri unu, nek pri la alia, apenaŭ pri ambaŭ vortoj, se oni proponas al ili vivi, ĉu servutaj, ĉu memstaraj, ili sendube preferas obei la prudenton ol servuti al iu homo, escepte eble de la Izraelanoj, kiuj sen neceso nek trudo donis al si tiranon : neniam sen aflikto mi legas la historion de tiu popolo, ĝis tia grado, ke mi perdas humanecon kaj ĝojas pri tiomaj katastrofoj, kiuj okazis al ĝi. Sed ĉiuj homoj, kiom ili konservas ion homan, sin allasas al submetiĝo nur pro trudo aŭ elreviĝo ; devigitaj fare de la alilandaj armeoj, kiel Sparto kaj Ateno sub la trupoj de Aleksandro, aŭ fare de la ribelaj partioj, kiel okazis antaŭe, kiam la atena regpovo falis en la manojn de Pisistrato. Pro trompo la homoj ofte perdas sian liberon ; kaj tiam ili estas malpli ofte trompitaj de la aliaj ol de si mem. Tiel la popolo en Sirakuzo, - la ĉefa sicilia urbo, nun nomata Saraguso, - minacata de milito, neprudente zorganta pri organizado nur kontraŭ danĝero, altigis Denizon al la unua rango kaj komisiis lin por komandi la armeon ; ĝi senpripense tiel rangaltigis lin, ke tiu ruzulo, venkinte, agis kvazaŭ li estus venkinta ne la malamikon, sed siajn samlandanojn ; armeestro li faris sin reĝo, reĝo li faris sin tirano. Oni ne povas imagi, kiel popolo, apenaŭ submetita, tuj falas en tiel profundan forgeson de libero, ke ĝi tute ne kapablas vekiĝi por reakiri ĝin ; ĝi servutas tiel lojale kaj volonte, ke oni povus opinii, ne ke ĝi perdis la liberon, sed gajnis la servutecon. Vere estas, ke komence oni obeas kontraŭvole, venkita de perforto ; sed la posteuloj, neniam vidinte la liberon kaj ne sciante tion, kio ĝi estas, servutas sen bedaŭro kaj volonte faras, kion iliaj antaŭuloj devige plenumis. Tio devenas de la fakto, ke la homoj naskiĝas sub la jugo ; nutritaj kaj edukitaj en servuteco, ne rigardante antaŭen, ili kontentiĝas per senŝanĝa vivo, ne suspektas alian posedaĵon aŭ rajton , ol kiujn ili ricevis, sekve konsideras natura sian denaskan staton. Tamen eĉ la plej malŝparema kaj senzorga heredinto kelkfoje ekrigardas al kontlibroj por kontroli, ĉu li ĝuas ĉiujn siajn rajtojn, aŭ ĉu iu deprenis ion de li aŭ de lia antaŭulo. Sed la kutimo, kiu ĉiurilate regas nin, ja neniam tiel efikas kiel en instruo pri servutado kaj - samkiel laŭdire Mitridato kutimiĝis trinki venenon - glutado de servuta veneno sen konscio pri amareco. Oni ne povas nei, ke la naturo estas en ni sufiĉe potenca por tiri nin, kien ĝi volas, tiel ke ni nin diru bone aŭ malbone dotitaj ; tamen ni konfesu, ke ĝi estas malpli potenca ol la kutimo, ĉar nia natura karaktero, kiel ajn bona ĝi estas, laŭplaĉe knedas nin malgraŭ la naturo. La bonaj semoj per kiuj la naturo provizas nin estas tiel malgrandaj kaj fragilaj, ke ili ne povas elteni la plej etan baton de la kontraŭa edukado. Ili sin vivtenas malpli

facile ol ili degeneras, velkas kaj neniĝas ; samkiel la fruktarboj konservas sian apartan karakteron, se oni lasas ilin kreski, sed tuj forlasas ĝin favore al fremdaj fruktoj, kiam oni greftas ilin. Ĉiu herbo havas proprajn ecojn, karakteron kaj apartaĵon ; sed la frostoj, la vetero, la grundo aŭ la laboro de ĝardenisto jen pliigas, jen reduktas ilian efikon. Iu planto tie vidita fariĝas nereconebla aliloke. Kiu vidus la Venecianojn, plenmanon da homoj tiel libere vivantaj, ke la plej malica el ili ne konsentus esti reĝo ; naskiĝintaj kaj edukitaj tiamaniere, ke ili ambicias nenion alian ol vete varti sian liberon ; tiele kutimigitaj jam ĉe la lulilo, ke ili rifuzus ĉiujn feliĉaĵojn el tutmondo kontraŭ plej eta ero el sia libero ; nu, kiu vidus tiujn homojn kaj tuj poste irus al la lando de tiu nomata Grandsinjoro °, tie vidante homojn, kiuj havas kiel vivcelon nur lian servadon, kiuj ofertas sian vivon por firmigi lian potencon, ĉu tiu opinius, ke ĉi tiuj kaj la aliaj havas saman naturon, aŭ ĉu li ne preferus opinii, ke, elirante el homa civito, li eniris brutejon ?

Likurgo, reganto en Sparto, laŭdire bredis du hundojn, ambaŭ fratojn, ambaŭ nutritajn el sama lakto ; unu grasiĝis ĉe la kuirejo, la alia kutimis vagi tra la kampoj je la kornosono. Por montri al la lacedemona popolo, ke kia edukado, tiaj homoj, li elmetis ambaŭ hundojn meze de la bazaro ; inter ili, supo kaj leporo : unu kuris al la supujo, la alia al la leporo. " Kaj tamen fratoj ili estas", li diris. Tial tiu viro, per sia leĝaro kaj administrado, tiel bone edukis kaj formis la Lacedemonanojn, ke ĉiu el ili preferus milfoje morti ol agnoski alian mastron ol la leĝon kaj la reĝon.

Mi plezuras rememorigi rakonton faritan de la favoratoj de Kserkso, la granda reĝo de Persio, koncerne la Spartanojn. Kiam Kserkso preparis grandan armeon por konkuri Grekion, li sendis siajn ambasadorojn al la grekaj urboj por postuli akvon kaj teron : tiamaniere la Persoj kutimis ordoni al la urbon kapitulacion. Al Sparto kaj Ateno li sendis nenion, ĉar la senditojn de lia patro Dario la Spartanoj kaj Atenanoj ĵetis en fosaĵon aŭ saltigis en puton, dirante, ke ili sentime prenu akvon kaj teron, por alporti al sia princo. Tiuj homoj ne povis toleri, ke oni atencu ilian liberon, eĉ per plej eta vorto. Pro tia ago, la Spartanoj eksciis, ke ili kolerigis la diojn mem, ĉefe Taltibion, dion de la heroldoj. Por pacigi tiujn diojn, ili sendis du el siaj samcivitanoj al Kserkso, kiujn li laŭplaĉe traktu, tiel venĝante la ambasadorojn de sia patro. Du Spartanoj, Spekto kaj Buliso, sin proponis por tiu repago. Ili foriris, kaj survoje atingis la palacon de iu Perso nomata Gidarno, reprezentanto de la reĝo en ĉiuj aziaj marbordaj urboj. Li honorige akceptis ilin, kaj de unu

° Grandsinjoro : sultano de Turkio.

parolo al la alia venis al demando, kial ili tiel forte rifuzas la amikecon de lia reĝo. "Kredu, Spartanoj, kaj eksciu de mi, kiel la reĝo scias honoru tiujn, kiuj egalvaloras lin, kaj pripensu tion, ke se vi apartenus al li, li same kondukus; se vi apartenus al li, kaj se li konus vin, ĉiu el vi nepre regus grekan urbon".

- Pri tio, Gidarno, diris la Lacedemonanoj, ci ne povas bone konsilini, ĉar la bonon promesitan ci jam provis, dum tiun de ni ĝuatan ci ne konas: ci ja spertis la reĝan favoron, sed ci scias nenion pri la libero, ĝia gusto, ĝia dolĉeco. Nu, se ci ekprovus ĝin, ci konsilus al ni defendi ĝin, ne per lanco kaj ŝildo, sed ja per dentoj kaj ungoj.

Flanke de la nura Spartano troviĝis la ĝustaj vortoj, sed certe ambaŭ kontraŭuloj parolis laŭ respektivaj edukadoj. Ne eblis, ke la Perso bedaŭru neniam ĝuitan liberon, ankaŭ ke la Lacedemonano toleru servuton, spertinte memstarecon.

Utika Katono, infano, ofte vizitis la diktatoron Sullo, kiu ĉiam akceptis lin kiel najbaron, altrangulon kaj parencon. La infanon ĉiam akompanis lia guvernisto, kiel konvenas al patricia infano. Li rimarkis, ke, en la palaco de Sullo, en la ĉeesto aŭ laŭ ordono de la mastro, oni enkarcerigas iujn, kondamnas la aliajn; iun oni ekzilas, alian oni strangolas; iu petis kontraŭ civitano konfiskon, la alia mortpunon. Entute ĉio okazis, ne kiel ĉe ŝtatfunkciulo, sed kiel ĉe tirano de popolo; tie estis ne juĝejo, sed tiraneca kaverno. Tiu nobla infano diris al sia guvernisto: "Kial vi ne donas al mi pardonon? Mi ĝin kaŝos sub mia robo. Mi ofte eniras la dormoĉambron de Sullo, antaŭ lia ellitiĝo. Mia brako estas sufiĉe forta por liberigi de li la urbon". Jen vere katona parolo. Lia komenco estis inda je lia morto. Eĉ se oni liveras nek lian nomon, nek lian landon, oni rakontu nur la realan fakton, ĉi tiu sufiĉe elokventos per si mem, por ke oni senriske konjektu, ke li estis denaska Romano, sed el vera, tiam libera Romo.

Kial mi diras ĉion ĉi? Ne ĉar mi opinias, ke la lando kaj la grundo iel efikas, - en ĉiuj landoj, sub ĉiuj klimatoj, servuto suferigas, libero ĝojigas.

Sed ĉar, mia opinie, oni kompatu tiujn, kiuj naskiĝante troviĝis sub la jugo, oni ekskuzu aŭ pardonu ilin, se, neniam vidinte eĉ la ombro de libero kaj sciante nenion pri ĝi, ili ne konscias pri la malbono esti sklavo. Se estas kelkaj landoj, kie la suno montriĝas alimaniere ol en la nia, se, lumiginte ilin dum ses sinsekvaj monatoj, ĝi lasas ilin dormetantaj en mallumo ne vizitante ilin dum la cetera duonjaro, - ĉu oni mirus, ke tiuj naskiĝintaj dum tiu longega nokto, neniam aŭdinte pri la taglumo,

kutimiĝas pri la denaska mallumo sen sopiro al lumo ? Oni neniam bedaŭras, kion oni neniam ĝuis, la bedaŭro venas nur post la plezuro kaj la memoro pri antaŭa ĝojo akompanas la konscion pri la bono. La naturo de l' homo inklinas lin al liberemo, sed ankaŭ al laŭeduka konformiĝo.

Ni do povas diri, ke ĉio, pri kio li edukiĝis kaj kutimiĝis, estas por li natura ; sed estas denaske esenca nur kio konformiĝas al lia simpla, ne difektita naturo ; tial la unua kaŭzo de memvola servuto estas la kutimo. Tiel okazas ĉe la plej bravaj kurĉevaloj kun detranĉitaj oreloj kaj vosto : komence ili mordas la enbuŝaĵon, poste ludas per ĝi ; dum iam ili kalcitris pro la selo, nun ili paradas en la jungilaro kaj sin glorigas sub la kovrilo. Ili diras, ke ili ĉiam estis regatoj, ke iliaj gepatroj tiele vivis. Ili opinias sin devigataj suferi la enbuŝaĵon kaj sin konvinkas per ekzemploj, pravigas la rajton de siaj tiranoj per longdaŭro, kvankam, verdire, delonga regado neniam rajtigas malutili, sed male pligravigas la malutilon. Tamen restas kelkaj, pli bone dotitaj ol la aliaj, kiuj sentas la jugpezon kaj ne povas sin deteni forskui ĝin ; nedreseblaj, ili ne rezignas konscion pri siaj naturaj rajtoj, nek memoron pri siaj antaŭuloj kaj sia unua vivmaniero, samkiel Uliso serĉadis sur maro kaj tero la fumon de sia kabano. Tiuj sagacaj kaj klarvidaj homoj ne kontentiĝas, kiel la popolaĉo, per ekrigardo al propraj piedoj, ili esploras kaj antaŭen kaj malantaŭen, ili vokas al pasinto por juĝi la estonton kaj taksu la nunon. Tiuj samaj homoj, denaske kapsanaj , ankoraŭ poluris sian menson per studado kaj kleriĝo. Eĉ se la libero estus forperdita kaj forĵetita ekster la mondon, ili ĝin imagus kaj sentus en sia spirito, ĝin ankoraŭ ĝuus, sen emo al kiel ajn maskita servuto.

La Granda Turko bone ekvidis, ke la libroj kaj la klero, pli ol io ajn, donas al la homoj interfratiĝemon kaj malamon al tiraneco. Tial ne troviĝas en lia lando pli da kleruloj, ol li deziras. Nu, ĝenerale, la bonvolo kaj varmkoro de kiuj konservis malgraŭ longa tempo kulton al libero, kiom ajn multaj ili estu, restas senefikaj, se ili ne konas unu la alian. Sub tirano, ili ne plu estas liberaj agi, paroli, kvazaŭ pensi. Ĉiu restas izolita en propraj pensoj. Tial Momo ° ne tro mokis, kiam li riproĉis Vulkanon, kiu faris homon sen luketo ĉe la koro por videbligi liajn pensojn. Oni diras, ke Bruto kaj Kasso ° , entreprenante liberigi Romon kaj eĉ la mondon, rifuzis la partoprenon de Cicerono, tiu fervora bonfaranto al popolo: ili juĝis lian volon tro malfirma por tiel grava faro, ili fidis lian bonvolon, sed dubis pri lia kuraĝo. Tamen, kiu volos trastudi la pasintajn

° Momo : sarkasma Dio.

° Bruto, Kasso: instigantoj de la komploto kontraŭ Cezaro.

eventojn kaj la antikvajn analojn, tiu konstatos malmultajn aŭ nenian fiaskon ĉe kiuj bonintence iniciatis liberigon de propra misregata lando, kvazaŭ la libero helpus sin mem reaperi. Harmodio, Aristogitono, Trasibulo, Bruto la maljuna, Valeriano, Diono ° tiel sukcese plenumis, kiel ili kuraĝe projektis. Tiaokaze, preskaŭ neniam mankas la bonsorto al bonkuraĝo. Bruto la juna kaj Kasso sukcesis forbalai la servuton, sed rekonkerante la liberon, ili mortis, tamen ne malinde (ĉar kiel blasfeme estus diri, ke estis io malinda en ilia vivo kaj morto!), sed granddomaĝe, malfeliĉe kaj tutruinige por la respubliko, kiu, mia opinie, estis enterigita samtempe kun ili. La postaj entreprenoj kontraŭ la romiaj imperiestroj estis nur komplotoj de ambiciuloj, ne kompatindaj pro malbonsorto, ĉar ili evidente celis ne forigi la kronon, sed forpuŝi la tiranon nur por konservi la tiranecon. Ilia sukceso estus bedaŭrinda, kaj mi estas kontenta, ke ili montris, per sia ekzemplo, ke oni ne devas ekspluati la sanktan vorton libero por krima entrepreno.

Sed mi revenu al mia temo, kiun mi preskaŭ forgesis: se la homoj volonte servutas, la unua kialo estas, ke ili naskiĝas kaj estas edukataj kiel servutuloj. De tio rezultas la dua, tio estas, ke, sub tiranoj, ili fariĝas malkuraĝaj kaj virineskaj: tial mi estas dankema al Hipokrato, prapatro de kuracarto, kiu sin gardis kontraŭ tiu degenero, kiel li diris en unu el siaj verkoj titolita "Pri malsanoj". Tiu persono havis ja firman koron, kiel li montris, kiam la Granda Reĝo ° provis allogi lin per ĉiaj proponoj kaj altvaloraj donacoj: li respondis, ke lia konscienco malpermesas al li resanigi Barbarojn, kiuj volas morton de Grekoj, kaj utili per sia arto al la reĝo, kiu celas subpremi Grekion. Oni ankoraŭ nun vidas inter liaj verkoj la leteron, kiun li sendis tiuokaze, ĝi por eterne atestos lian kuraĝon kaj noblecon. Do certe estas, ke oni perdas la kuraĝon samtempe kun la libero. Nek entuziasmo, nek akreco en la batalo montras la submetitojn. Ili iras al danĝero kvazaŭ ŝnurligitaj, senvigilaj kaj nur pro neeblo elŝteliĝi. Ili ne sentas en sia koro tiun bolantan liberardon, kiu igas maltimi la danĝeron kaj instigas al akiro de honoro kaj gloro kontraŭ bela morto inter siaj kunuloj. Ĉe la liberaj homoj, ĉiuj vete luktas por la komuna utilo, ili plene partoprenas la malbonon de la malvenko aŭ la bonon de la venko. Dume la servutuloj perdas, krom la milita kuraĝo, ĉiurilatan viklecon, ili havas malnoblan kaj malfervoran koron kaj ne kapablas plenumi gravajn agojn. Tion ja scias la tiranoj, kiuj favoras tiun inklinon por pligravigi tiun senenergiecon.

° Harmodio, Aristogitono murdis Pisistraton. Trasibulo forigis la tiranismon el Ateno (409 a.K.). Bruto la maljuna kaj Valeriano troviĝis inter la fondintoj de la Roma Respubliko. Diono forpelis Denizon de Sirakuzo, sed starigis propran tiranecon.

° Granda Reĝo: Persa suvereno.

Ksenofono, grava unuaranga inter la grekaj historiistoj, verkis libreton en kiu Simonido parolas kun Hierono, reĝo en Sirakuzo, pri la malfeliĉoj de la tirano. Tiu verko abundas per trafaj admonoj, plejeble laŭdindaj, miaopinie. Dio volu, ke ĉiuj ĝisnunaj tiranoj havu ĝin antaŭ la okuloj, kaj uzu ĝin kiel spegulon! Mi ne povas kredi, ke ili ne rekonas proprajn verukojn kaj ne hontus pri siaj makuloj. En tiu traktaĵo Ksenofono emfazas la penigan pozicion de tirano, kiu malbonfarante al ĉiuj, ĉiujn devas timi. Inter aliaj aferoj, li diras, ke la malbonaj reĝoj uzas alilandanojn por siaj militoj kaj pagas ilin, pro timo armi proprajn regatojn al kiuj ili malutilis. Ja ekzistis bonaj reĝoj, kiuj dungis eksterlandajn popolojn, eĉ francajn reĝoj, kvankam pli ofte iam ol nun; sed ilia celo estis alia, t.e. ŝpari siajn soldatojn, konsiderante, ke ili valoras pli ol ajna monsumo. Tial Scipiono la granda Afrikano, se mi ne eraras, diris, ke li preferus savi unu civitanon ol venki cent malamikojn. Estas ja certe, ke tirano neniam opinias sian povon firma dum li superregas eĉ unu valoran homon: do oni trafe apliku al li, kion Trazono, laŭ Terencio, fieras riproĉi al la mastro de elefantoj:

"Tiel brava en tio vi estas

Ke vi pri bestoj respondas."

Sed nenio pli klare evidentigas la tiranan ruzon brutigi siajn regatojn, ol la konduto de Ciro kontraŭ Lidianoj, post kiam li sturme prenis Sardeson, la lidian ĉefurbon, kaj kaptis Krezon, tiun tiel riĉan reĝon, kiu mallibera sekvis lin. Oni informis lin, ke Sardesanoj ĵus ekribelis. Li rapide submetis ilin. Sed ĉar li volis nek disrabi tiel belan urbon, nek daŭre lasi armeon por gardi ĝin, li sin elturnis por teni ĝin. Li starigis bordelojn, drinkejojn, ludejojn kaj ordonis, ke la loĝantoj uzu ilin. Tio montriĝis tiel efika, ke neniam plu poste la reĝo bezonis ekmiliti kontraŭ Lidianoj. Tiu kompatindulo amuziĝis elpensante ĉiuspecajn ludojn, tiel ke Latinanoj tiris el tio vorton: kion ni nomas tempopasigilo, tion ili nomas "ludi", kvazaŭ ili volus diri "Lidi". Ne ĉiuj tiranoj tiel eksplicite deklaris, ke ili celas virinigi siajn virojn, sed fakte estas, ke, kion ĉi tiu formale dekretis, tion kaŝe celis plejparto el la aliaj. Verdire, tia estas la natura karaktero de la popolamaso, kiu estas pli multnombra en la urboj. Ĝi estas suspektema kontraŭ kiu ĝin amas, kaj simplanima kontraŭ kiu ĝin trompas. KREDU tion: neniu birdo estas tiel facile kaptebla per kriĉaso, neniu fiŝo tiel gluteme sin alkroĉas al hoko, kiel ĉiuj popoloj logiĝas al servuto, se nur per plej eta plumo oni tiklas ilian buŝon. Kaj mirige estas, kiel ili sin allasas, tuj kiam oni apenaŭ tiklas ilin. Teatraĵoj, ludoj, farsoj, spektakloj, strangaj

bestoj, medaloj, bildoj kaj similaj trompiloj estis por la antikvaj popoloj la logaĵoj al servuto, la prezo de ilia libero, la iloj de la tiraneco. Tiun rimedon, tiun procedon, tiujn logaĵojn uzis la antikvaj tiranoj por dormigi siajn regatojn sub la jugo. Tiel la stultigitaj popoloj admiris tiujn tempopasigilojn, amuzato de vana plezuro pasanta antaŭ iliaj okuloj; ili kutimiĝis servuti same naivege, sed pli malbone, ol la infanoj, kiuj lernas legadon pro videmo al brile kolorigitaj bildoj. Alian rimedon elpensis la romiaj tiranoj, ofte regalante la dekuriojn °, trompante tiun trivialaron, kies plej ŝatata ĝuo estis manĝado: la plej prudenta el ili ne rezignus sian teleron da supo por reakiri la liberon de la respubliko laŭ Platono. La tiranoj malavare disdonis grenon, vinon, sestercojn; tiam estis plorinde aŭdi la krion: Vivu la reĝo! Tiuj stultuloj ne konsciis, ke en tio ili nur rericevas parton de propra havaĵo, kiun parton la tirano ne povus doni, se antaŭe li ne forprenus ĝin de ili. Kiu hodiaŭ kaptas sestercon, plenŝtopiĝas ĉe publika festeno, benante Tiberion kaj Neronon pro ilia donacemo, tiu morgaŭ estos devigata fordoni sian havaĵon al avidemo, siajn infanojn al diboĉo, sian sangon mem al krueleco de tiuj pompaj imperiestroj, ne parolante pli ol ŝtono, ne moviĝante pli ol ŝtipo. Tia ĉiam estis la popolaĉo. Ĝi pretas facile kaj diboĉeme sin allasi al kondamninda plezuro, sed restas indiferenta pri la malbono kaj doloro, kiujn honeste ĝi ne devus suferi. Mi nun konas neniun, kiu, aŭdante pri Nerono, ne ektemas je la nura kromnomo de tiu malbela monstro, de tiu naŭza kaj malpura besto; kaj tamen oni povas diri, ke, post lia morto tiel malbela kiel lia vivo, la roma popolo tiel afliktiĝis (memorante pri ludoj kaj festenoj), ke ĝi preskaŭ funebris lin, laŭ Kornelio Tacito, unu el la plej seriozaj verkistoj, tute fidinda. Pri tio oni ne miru, se oni konsideras, kion faris tiu sama popolo je la morto de Julio Cezaro, kiu tute malatentis leĝojn kaj liberon; en li oni trovas, miaopinie, nenion valoran krom lia humaneco, kiu, kvankam tiel laŭdita, pli malutilis ol la plej granda krueleco de plej sovaĝa iam trovebla tirano, ĉar tiu venena mildeco verdire sukeris la servuton. Post lia morto, tiu popolo, kies buŝo memoris liajn bankedojn, kies spirito liajn prodigaĵojn, por honorigi kaj cindrigi lin vete amasigis publikajn bruligotajn benkojn, poste starigis kolonon dediĉitan al la patro de l'popolo (laŭ surkapitela teksto) kaj pli honorigis lin, kvankam mortinta, ol ĝi devus fari al iu ajn vivanto, escepte de liaj mortigintoj. La romiaj imperiestroj ankaŭ ne forgesis preni la titolon popola tribunuso, unuflanke ĉar tiu posteno estis konsiderata sankta, aliflanke ĉar ĝi celis defendi kaj protekti la popolon sub la ŝtata aŭspicio.

° dekurio: politika grupo de dek samklasaj personoj.

Tiel ili certiĝis pri la popola fido, kvazaŭ la regatoj atentus pli la titolon ol la rezulton.

Hodiaŭ tiuj ne multe pli bone agas, kiuj ne malutilas, eĉ grave, sen ŝirmo de belaj vortoj pri publika bono : ĉar ci funde konas, ho Longa °, la formularon, kiun ili povas sufiĉe lerte uzi en iuj cirkonstancoj. Sed en plej oftaj okazoj, lerteco ne povas sufiĉi kontraŭ tiela senhonto. La reĝoj de Asirio, poste tiuj de Medio, plejeble prokrastis sian unuan publikan aperon por ke tiu popolaĉo ekpensu, ke ili estas iel superhomoj kaj inklinigi al tiu fantazio tiujn, kiuj ŝatas imagi, kion ili ne povas vide juĝi. Tial multaj nacioj, kiuj sufiĉe longe apartenis al tiu asiria imperio, kutimiĝis servuti dank'al tiu mistero kaj pli volonte servis, ĉar ili ne konis sian mastron, eĉ apenaŭ sciis, ĉu li ekzistas, kaj blinde timis iun neniam viditan. La unuaj reĝoj de Egiptio malofte montriĝis sen branĉo aŭ fajro sur la kapo kaj tiel maskitaj imitis la foirajn ĉarlatanojn ; per tia strangaĵo ili inspiris al siaj regatoj ian respekton kaj admiron, dum ili aperus nur ridinda tempopasigilo al homoj ne tro stultaj aŭ sklavigitaj.

Estas plorinde aŭdi, kiom da ruzaĵoj la iamaj tiranoj uzis por starigi sian povon, kiom da etaj friponaĵoj ili grandskale profitis ; ili trovis tiun popolaĉon laŭ sia arbitro, preta fali en la plej mallerte etenditan reton, tiel facile trompebla, ke ju pli ili mokis ĝin, des pli ĝin ili subigis.

Kion diri pri alia absurdaĵo, kion antikvaj popoloj tre serioze akceptis ? Ili firme kredis, ke la dika piedfingro de Pirro, reĝo de la Epiranoj, faris miraklojn kaj resanigis lienmalsanulojn. Plie, ili ornamis tiun fabelon rakontante, ke tiun piedfingron oni trovis sendifekta inter la cindroj de la bruligita kadavro. Ĉiam la popolo forĝis al si mensogojn, kiujn poste ĝi firme kredos. Sufiĉe multaj verkistoj raportis pri tio, laŭ maniero, kiu evidente pravas, ke ili inspiriĝis per urbanaj onidiroj kaj popolaĉa parolstilo. Vespaziano plenumis miraklojn, revenante el Asirio kaj trapasante Aleksandrion por kapti en Romo la imperiestrecon. Li rektigis la lamulojn, redonis vidkapablon al la blinduloj, se ne paroli pri aliaj belfaroj : kiu ne vidis en tio la trompaĵon, tiu estis pli blinda ol la resanigitaj blinduloj. La tiranoj mem miris pri la kapablo de la homoj toleri malbonfaranton : ili uzis la religion kiel gardostaranton kaj laŭeble pruntis ian diecon por subteni sian malindan vivon. Tial Salmoneo °, laŭ la sibilo en la vergilia infero, nun pentopagas en subinfero sian trompmokon al homoj kaj uzurpan jupiterumadon,

° vidu noton p.9.

° Salmoneo : filo de Eolo (Eneado).

Kruele turmentita pro lia imitado
 De jupitera fulmo, de ĉiela tondrado.
 Li svingas, rajdante kvadrigon galopantan,
 En altlevita pugno la torĉon brilflamantan.
 De Elid' ekiris en pempaj patroloj
 Meze de urboplacoj, tra grekaj popoloj,
 Tiel fanfara li aplombe retenas
 La honoron, kiu nur al dioj apartenas.
 La sanktan fulmotondron de Ĉiopova Patro
 Imitas malsaĝulo per hurla sonpaletro
 El bronza trumpetado kaj galopo terura :
 El Patro sekvas tuj de krimo puno nepra,
 Ne sufiĉas al Li flamigilon ĵeti,
 Ankaŭ ne vaksotorĉon, eĉ se meĉon meti,
 Sed ja per fulma bato de horora ŝtormo
 Li rulkapigis lin al subinfera dormo.

Se tiu, kulpinte nur stultaĵon, estas nun tiamaniere traktata en infero,
 mi opinias, ke, kiuj trouzis la religion ~~mal~~intence, tiuj trovos tie pli kruelan
 sorton.

Niaj tiranoj uzis en Francio ion similan, bufojn, liliflorojn, sanktan
 ampolon ° kaj oriflamon. Tion iel ajn mi ne volas ne kredi, ĉar ni kaj niaj
 prauloj havis neniun motivon rifuzi tiun kredon : ni ĉiam havis reĝojn tiel
 bonajn en paco, tiel kuraĝajn en milito, ke, kvankam reĝoj ili naskiĝis, ili
 estas kvazaŭ ne kreitaj de la naturo kiel la aliaj, sed elektitaj de ĉiopova
 Dio, antaŭ ol naskiĝi por gvidi kaj gardi ĉi tiun reĝolandon. Eĉ se ne tiel
 estus, ni volus ekbatali nek por diskuti pri la vereco de nia historio, nek
 por zorge ekzameni ĝin, pro la risko fuŝi tiun belan debaton, en kiu povos ja
 skermi nia franca poezio, nun ne plibonigita, sed tute renovigita de niaj
 Ronsardo, Baifo, Du Bele (Du Bellay), kiuj tiel progresigas nian lingvon, ke
 baldaŭ, tion mi esperas, Grekoj kaj Latinanoj tiurilate superos nin nur laŭ
 pliaĝeco. Mi maljustus al nia rimarto (tiun vorton mi volonte uzas ĉar
 plaĉa) - kvankam kelkaj tiras ĝin al mekanikeco, mi konas sufiĉe da poetoj
 kapablaj redoni ĝian noblecon kaj unuan honoron - mi maljustus al ĝi, mi
 rediru, forprenante de ĝi la belajn rakontojn pri reĝo Klodvigo ; mi jam
 antaŭvidas kiel agrable, kiel facile plezuros ĉe tia temo la inspiro de nia
 Ronsardo, kia en "Franciado". Mi konas la kapablon, la akran spiriton, la
 gracion de tiu poeto. Li faros el la oriflamo tiel bonan uzon, kiel la

° sankta ampolo : ĝi entenis benitan oleon, uzitan por la konsekrado de
 francaj reĝoj.

Romanoj el siaj ŝildoj

"Kaj de l'ĉielaj ŝildoj teren ĵetitaj, "

kiel diras Vergilio. Li domaĝos nian sanktan ampolon samkiel la Atenanoj sian korbon de Eriktono ° ; li paroligos pri niaj militaj grandfaroj samkiel ili per sia olivo, kiun ili pretendas daŭre teni en la Turo de Minerva. Mi estus aroganta, se mi volus kontraŭdiri niajn librojn kaj uzurpe kuri sur la kampo de niaj poetoj. ° Sed revenante al mia temo, kies fadenon mi perdis nesciante kiamaniere, ĉu la tiranoj ne penadis ĉiam kutimigi sian popolon, ne nur al obeo kaj servuto, sed ankaŭ al kulto ? Tial kion mi ĝis nun citis kiel rimedon por instrui al homoj volonte servuti, tio utilas al tiranoj nur por popolaĉo.

Sed nun mi venas al tiu punkto, en kiu, laŭ mi, kuŝas la sekreto kaj la kerno de la superreĝo, la subtenilo kaj fundamento de la tiranismo. Kiu opinias, ke la halebaroj de gvardianoj, la situo de gvardiejo protektas la tiranon, tiu tute eraras, laŭ mi ; ŝajnas al mi, ke tiu tirano uzas ilin pli kiel formalaĵon kaj timigilon, ol pro fido al ili. La arkistoj malpermesas eniri la palacon al sendanĝeraj ĉifonuloj, ne al armitoj kapablaj ion entrepreni. Estas ja facile kalkuli, ke malpli da romiaj imperiestroj sin savis de iu danĝero dank'al siagvardia helpo, ol da ili estis mortigitaj de siaj gvardianoj mem. Defendas la tiranon nek rajdistaj bandoj, nek piedsoldataj rotoj, nek armiloj. Kvankam oni ne tuj kredas tion, tamen vera tio estas . Ĉiam estas nur kvar aŭ kvin personoj, kiuj subtenas la tiranon kaj tenas landon sub servuto. Ĉiam tiel estis, ke kvin aŭ ses individuoj ĝuis favoron de tirano, kaj jen propravole proksimiĝis, jen estis alvokitaj por roli kiel komplicoj de liaj kruelaĵoj, kunuloj de liaj plezuroj, parigistoj de liaj voluptoj, profitantoj de liaj rabadoj. Tiuj ses uloj influas sian estron tiamaniere, ke li trudu al la socio ne nur proprajn malicaĵojn, sed ankaŭ la iliajn. Tiu seso regas sescent subulojn, kiuj protektate pliriĉiĝas kaj kondukas al la seso, samkiel ĉi tiu al la tirano. Tiu sescento tenas sub si sesmil individuojn, kiujn ili altigis, al kiuj ili havigis jen guberniestran oficon, jen manipulado de impostoj ; tiel ili kontrolas la avidon kaj kruelon de tiuj malbonfarantoj, kiuj nur dank'al ilia protekto povas daŭri kaj sin

° Eriktono : legenda atena reĝo, duonviro-duonserpento. Li fondis la Panateneojn, festojn en kiuj defilis kaneforoj (junulinoj kun korbo sur la kapo).

° Per tiu longa parentezo, La Boesi ne povas sin deteni de omaĝo al siaj samtempuloj, la francaj renesancaj poetoj, grupiĝintaj en la Plejada skolo. Li admiris ilian strebado al renovigo de la poezia lingvo. Inter ili, li montris apartan kulton al la plej fama kaj talenta, Ronsardo.

forsavi el leĝaj punoj. Gravaj sekvoj rezultas el tiu sistemo. Kiu volus amuziĝi malplektante tiun reton, tiu konstatus, ke ne nur sesmil, sed centmil, milionoj da homoj estas ligitaj de tiu ŝnuro al la tirano, samkiel, laŭ Homero, Jupitero fanfaronas, ke, se li tiros al si la ĉenon, li kuntiros ĉiujn diojn. De tio venas la ŝvelo de senato sub Julio Cezaro, la multobligo de novaj postenoj kaj oficoj, verdire tute ne por plibonigi la justicon, sed ja por firmigi la tiranismon. Oni fine venas al tio, ke pro la favoraĵoj kaj la rektaj aŭ nerektaj profitoj akiritaj sub la tiranoj, troviĝas kvazaŭ tiom da homoj opiniantaj tiranecon profitdona, kiom da liberamantoj. Kiel la kuracisto asertas, ke, se en nia korpo troviĝas io malsana, tuj kiam aperas aliloka nenormalaĵo, ĝi sin direktas al la jam gangrena loko, - same tuj kiam iu reĝo sin proklamas tirano, la tutlanda popolfreĝo, ne nur la banalaj ŝtelistoj kaj senoreligitoj kapablaj grave nek utili nek malutili, sed la ardaĵoj ambiciuloj kaj notindaj aviduloj, amasiĝas ĉirkaŭ tiu tirano kaj subtenas lin por partopreni la rabaĵon kaj roli kiel tiranetoj. Tiel agas la plej famaj ŝtelistoj kaj korsaroj. Unuj esploras la regionon, la aliaj postkuras la vojaĝantojn; unuj embuskas, la aliaj gvatas; unuj buĉas, la aliaj priŝtelas, kaj, kvankam estas hierarkio inter servantoj kaj gvidantoj, tamen fine ne estas unu, kiu sin konsideras fremda al la ĉefa rabaĵo, almenaŭ al la esploro. Oni rakontas, ke la ciliciaj piratoj ne nur grupiĝis tiel multnombro, ke necesis sendi kontraŭ ili la Grandan Pompeon, sed ankaŭ ligis al si plurajn belajn kaj grandajn urbojn en kies havenon ili rifuĝis post rabekskurso; rekompence ili donacis ian profiton kontraŭ ricelado de la rabaĵo.

Tiel la tirano servutigas siajn regatojn uzante iujn kontraŭ la aliaj; li estas gardata de tiuj kontraŭ kiuj li devus sin gardi, se ili ion valorus; sed, kiel oni diras, por fendi lignon, li faras kojnojn el tiu ligno mem. Tiaj la arkistoj, la gardistoj, la halebardistoj. Verdire, ili mem kelkfoje suferas pro li. Sed tiuj perditoj, tiuj forlasitoj de Dio kaj de l'homoj, estas kontentaj elporti malbonon, ne por reciproki ĝin al kiu kaŭzas la ilian, sed por suferigi tiujn, kiuj senpove suferas kiel ili. Tamen, kiam mi vidas, kiel ili lakeas la tiranon por sin vivteni per lia tutpovo kaj la popola servuto, ofte mi miregas pro ilia malbonkoreco kaj kelkfoje kompatas ilian stultecon. Ĉar, por ĝuste diri, ĉu aliĝi al la tirano havas alian signifon, ol rezigni propran liberon kaj iel ambaŭmane premi servuton kaj kisi ĝin? Ili flankenmetu sian ambicion, ili iom forgesu sian avidon, kaj poste ili sin rigardu, sin rekonu, tiam ili klare vidos, ke tiuj vilagaĵoj, tiuj kampuloj, kiujn ili plejeble piedpremas pli ol punlaborulojn aŭ sklavojn, kvankam malbone traktataj, estas bonsortaj kaj iel liberaj, kompare kun ili. La plugisto, la metiisto, kiel ajn dependaj ili estas, kvitiĝas plenumante ordonojn. Dume la tirano vidas la

aliajn, siajn kunvivantojn, friponantaj kaj almozantaj lian favoron. Ili devas, ne nur fari kion li ordonas, sed pensi kion li volas kaj ofte, por kontentigi lin, antaŭdiveni lian penson. Ne sufiĉas, se ili obeas, ili ankaŭ flatkomplazu lin, ili rompiĝu, ili sin turmentu, ili ellaciĝu laborante por li, ili ankaŭ plezuriĝu el lia plezuro, ili oferu propran guston al la lia, ili perfortu sian temperamenton, ili seniĝu je sia natura karaktero. Ili atentu pri liaj paroloj, lia voĉo, liaj signoj, liaj okuloj ; ĉio ilia, okuloj, piedoj, manoj, sin dediĉu al gvatado por spioni liajn dezirojn kaj diveni liajn pensojn. Ĉu oni nomu tion feliĉa vivo ? ĉu eĉ vivo ? ĉu en la mondo ekzistas io pli maltolerebla, ne nur al honorinda homo, sed al prudentulo aŭ eĉ homaspektanto ? Kia sorto estas pli mizera ol tia vivo kun nenio propra, dum kontenteco, libero, korpo, vivo dependas de aliulo ?

Sed ili volas servuti por havigi al si riĉaĵojn : kvazaŭ ili povus proprigi ion al si, dum ili ne povas diri, ke ili apartenas al si mem. Kaj, kvazaŭ iu ajn povus posedi ion propran sub tirano, ili pretendas proprieti ion, forgesante, ke ili mem donas al li la forton senposedigi ĉiujn kaj lasi nenion propran al iu. Ili konstatas, ke nenio pli ol riĉaĵoj instigas iun homon al kruelo, igas juĝi krimon mortpuninda ; ke li ŝatas nur riĉaĵojn , mortigas nur la riĉulojn, kiuj montriĝas antaŭ li kvazaŭ antaŭ buĉisto, bonhavaj kaj envivekaj. Tiuj favoratoj devus memori malpli pri kiuj multe riĉiĝis ĉe la tirano, ol pri kiuj kelktempe amasigis kaj poste perdis kaj havaĵon kaj vivon. Ili devus pripensi, ne kiom da homoj gajnis riĉaĵojn, sed kiom malmultaj konservis ilin. Oni trarigardu la tutan antikvan historion, ankaŭ tiun de ni memoratan, oni klare vidos, kiom multe da homoj, favoriginte al si la princojn per malindaj rimedoj, profitinte ilian kruelon aŭ simplanimecon, fine estis de ili neniigitaj ; ju pli facile ili sin levis, des pli malfacile ili firmigis sian pozicion. El tiom da homoj, kiuj proksimiĝis al malbonaj reĝoj, malmultaj aŭ preskaŭneniu ne proprasperte suferis la tiranan kruelon, kiun ili antaŭe incitis kontraŭ aliuloj. Pliofte, riĉiĝinte dank'al princa favoro per alies posedaĵo, ili siavice riĉiĝis aliulojn per propra posedaĵo.

La honestuloj mem, se hazarde troviĝas iuj ŝatataj de la tirano, kiel ajn favorataj, kiel ajn brilvirtaj ili estas, tiagrade, ke eĉ al malbonuloj ili trudas respekton, tiuj honestuloj mem ne povas daŭre rezisti, ankaŭ ilin trafas la komuna malbono, kaj ili proprakoste spertas la tiranecon. Tiu trio da honestuloj, Seneko, Burro, Trazeo °, - malbonsorto sendis du el ili al tirano kiu komisiis ilin zorgi pri liaj aferoj ; ambaŭ ili estimis kaj amis ; plie unu el ili iam edukis lin, kio garantiis lian amikecon, - tiu trio sufiĉe

° Seneko, Burro, Trazeo : konsilantoj de imperiestro Nerono.

atestas per sia kruela morto, kiel malmulte fidinda estas la favoro de malbonaj mastroj. Cetere, kiam amikecon oni povas esperi flanke de kiu tiel malmolkore malamas sian tamen obeantan landon, malfortigas sin mem kaj detruas propran imperion ?

Nu, se oni opinias, ke tiuj homoj viktimiĝis pro virta vivo, oni esploru ĉirkaŭ la tirano mem : oni konstatos, ke, kiu per malbonfaroj akiris kaj konservis lian favoron, ne pli longe vivis. Kiu aŭdis pri tiel profunda amo, tiel konstanta inklino ? kiu legis pri viro tiel obstine ligita al virino, kiel al Popea . Tamen li mem poste venenigis ŝin. Lia patrino, Agripino, por certigi al li la imperiestracon, estis mortiginta sian edzon Klaŭdio. Por komplezi lin, ŝi neniam hezitis fari aŭ elporti ion ajn. Nu, ŝia filo mem, ŝia mamsuĉinto, tiu imperiestro de ŝia mano farita, post oftaj provoj, fine mortigis ŝin ; kaj ĉiuj diris, ke ŝi tute meritis tiun punon, kvankam ĝi devus veni el aliaj manoj ol filaj. Kiu iam estis pli influebla, pli simplanima, ĝustadire pli naivega ol imperiestro Klaŭdio ? Kiu pli blinde enamiĝis al iu virino, ol li al Mesalina ? Li fine liveris ŝin al la ekzekutisto. Malspriteco ĉe la tirano ĉiam malhelpas lin bonfari. Sed, mi ne scias kial, kiel ajn malmulte da menskapablo li havas, tio sufiĉas por veki lian kruelecon eĉ kontraŭ liaj kunuloj. Tipa estas la diro de kiu, vidante nuda la kolon de sia plejamata edzino sen kiu li ŝajne ne povus vivi, tiel parole karesis ŝin : "Tuj fortranĉita estos tiu bela kolo, se tion mi ordonos ". Jen kial plejparto el la antikvaj tiranoj estis komune mortigitaj de propraj favoratoj, kiu, spertinte la esencon de la tiranismo, malpli fidis la bonvolon de tirano, ol ili malfidis lian povon. Tial Domicianon mortigis Stefano, Komodon unu el liaj favoratinoj, Antonenon ° Makrino, kaj same preskaŭ ĉiuj aliaj.

La kialo estas, ke la tirano neniam amas, nek estas amata. Sankta nomo, sankta afero, amikeco ekzistas nur inter honestuloj, ĝi naskiĝas nur el reciproka estimo ; konservas ĝin ne tiel komplezo, kiel bonkonduĉo. Kio donas al amiko fidon pri la alia, tio estas la scio pri lia honesteco, atestata de naturbona karaktero, sincero kaj konstanteco. Kie estas kruelo, mallojaleco, maljusteco, tie ne povas esti amikeco. Kiam malbonuloj grupiĝas, tio estas komploto, ne kunesto. Ili reciproke ne sin amas, sed timas. Ne amikoj ili estas, sed komplicoj.

Nu, eĉ se ne tiel estus, tamen oni malfacile trovas ĉe tirano fidindan amon, ĉar, superante ĉiujn, ne havante kunulojn, li jam staras trans la limoj de amikeco, kiu celas justecon, kiu neniam konsentas lami, sed ĉiam egala estas. Tial ja ekzistas inter ŝtelistoj ia fido ĉe disdivido de la rabaĵo, ĉar ili

° Antoneno : pli konata kiel Karakalo.

estas egalaj kunuloj, ankaŭ ĉar se ili ne sin interamas, almenaŭ ili sin intertimas kaj ne volas malfortigi sin pro malkonkordo. Sed koncerne la tiranon, neniam liaj favoratoj povas fidi lin, des pli, ke ili mem instruis al li, ke li povas ĉion, ke neniu rajto, neniu devo ligas lin, ke en lia pozicio deziro lia signifas racion, ke li estas nenies kunulo, sed ĉies mastro. Ĉu do ne estas kompatinde, ke, fronte al tiom da elokventaj ekzemploj, tiel evidenta danĝero, neniu deziras saĝiĝi kontraŭ la aliaj ? ke, el tiom da homoj volonte proksimiĝantaj al tirano, ne troviĝas unu kapabla prudente kaj kuraĝe diri, kiel laŭ iu fablo la vulpo al leono sin ŝajniganta malsana: "Mi volonte vizitus cin en cia leonejo ; sed mi vidas tro da spuroj de bestoj alirantaj al ci, dum neniun returnintan" ?

Tiuj kompatinduloj vidas rebrili la trezorojn de la tirano, mirege gapas al la disradiado de lia luksego ; allogite de tiu lumo, ili alproksimiĝas ne rimarkante, ke ili sin ĵetas en la flamon nepre konsumantan ilin. Tiel la nesingarda satiruso, laŭ fabloj, vidante la brilon de la fajro eltrovita de saĝa Prometeo, trovis ĝin tiel bela, ke li kisis ĝin kaj brulvundiĝis. Same la papilio, esperante ian ĝuon, sin ĵetas en la flamon pro ĝia lumo kaj spertas la alian efikon, tiun bruligantan, laŭ rakonto de la lukka poeto.^o Sed ni cedu, ke tiuj lakeoj elglitiĝu el la manoj de tiu, kiun ili servas. Ili neniam sin forsavas de la postvenanto. Se ĉi tiu estas bona, necesas prezenti siajn kontojn kaj almenaŭ tiam submetiĝi al la regulo. Se li estas malbona kaj simila je ilia antaŭa mastro, jam ne mankas al li propraj favoratoj, kiuj ordinare ne kontentiĝas per alies postenoj kaj krome postulas kaj la havaĵon kaj la vivon de siaj antaŭuloj. Ĉu eblas, ke troviĝu iu deziranta, kun tia risko kaj necerteco, preni tiun mizeran oficon, servi tiel penige tiel danĝeran mastron ? Kia peno, kia martiriĝado, Dio granda ! Tagnokte cerbumi, kiel oni pleĉu al iu, tamen timante lin pli ol ajnan aliulon ; per tutaj okuloj kaj oreloj ĉiam spioni de kie venos la bato, por malkaŝi la embuskojn, por flari la vizaĝesprimon de siaj kunuloj, por diveni la perfidonton, ridmieni al ĉiu, sed ĉiujn timi, konsideri ĉiun nek proklamita malamiko, nek fidinda amiko ; ĉiam kun ridanta vizaĝo kaj timfrosta koro, ne povi esti ĝoja kaj ne kuraĝi esti trista !

Sed plezurige estas konsideri kian profiton ili eltiras el tiu turmento kaj kian bonon ili atendu el sia penado kaj kompatinda vivo. La popolo volonte kulpigas pri sia sufero ne la tiranon, sed siajn regantojn : ties nomojn, ties malvirtojn konas la popoloj, la nacioj, ĉiuj, eĉ la kamparanoj kaj la plugistoj;

^o la lukka poeto : Petrarko, kiu naskiĝis en Lukko.

ĉi tiuj superŝutas ilin per milopaj insultoj, hontindaĵoj, malbenoj .
Kontraŭ ili ĉiuj preĝoj, ĉiuj deziroj sin direktas. Ĉiujn malfeliĉojn,
ĉiujn pestojn, ĉiujn malsategojn oni riproĉas al ili. Se iafoje oni ŝajne
honorigas ilin, eĉ tiam oni malbenas ilin el korfundo kaj oni ilin abomenas
pli ol sovaĝajn bestojn. Jen la gloro, jen la honoro per kiuj pagas iliajn
servojn la popolanoj, kiuj, eĉ se ili ricevas po unu ilian korpoparton, tamen
sin konsiderus nek kontentaj nek duonsatigitaj. Plie, ankoraŭ post ilia
morto, iliaj postvenantoj ne estas tiel mallaboremaj, ke la nomo de tiuj
popolmanĝintoj ne estu nigrigita de mil plumoj, ilia famo dispecigita tra
mil libroj, iliaj ostoj mem insultitaj de la posteularo kiel postmorta puno
pro ilia malbona vivo.

Ni do iafoje lernu, ni lernu bone agi. Al Ĉielo ni levu la okulojn,
aŭ pro nia honoro, aŭ pro amo al virto mem, ni levu la okulojn al Ĉielo, al
ĉiopova Dio, certa atestanto pri nia konduto kaj justa juĝanto de niaj
kulpoj. Koncerne min, mi firme kaj senerare opinias, - ĉar nenio pli ol
tiranismo estas kontraŭa al grandanima Dio, - ke Li ie rezervas por tiranoj
kaj ties komplicoj apartan turmenton.

.-----O-----.